## LA STATUTAJ CELOJ DE *DEC*

Asociiĝo de esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto en la projektoj de kolektado, arkivado, konservado, protektado, valorigo, dokumentado, prilaboro kaj uzado de libroj, gazetoj, fotoj, dokumentoj kaj aliaj presitaj, skribitaj, fotitaj, filmitaj, sonaj kaj elektronikaj materialoj en kaj pri la Internacia Lingvo Esperanto, savado de tiaj materialoj el pereo kaj klopodado protekti ilin flanke de urbaj, regionaj aŭ ŝtataj institucioj kiel nacian kulturan heredaĵon, organizado de informa, eduka, kultura, eldona kaj aliaj aktivaĵoj.






**La tradicio de Esperanto ekde 2019 en Kroatio estas proklamita NEMATERIA KULTURA HAVAĴO.**

**DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO estas la ĉefa prizorganto de tiu tradicio.**

**DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO estas societo fondita en 2010. Inter 2017 kaj 2022 ĝi konstruis sian domon kun la financa helpo de multaj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj. En 2023 DEC omaĝis siajn bonfarantojn per starigo de memortabulo.**

# Via fidinda Esperanto-partnero en Kroatio!

## MISIO

Konservado de la Esperanta heredaĵo por estontaj generacioj kaj konstrudo de favora socia medio kaj pozitiva publika opinio pri Esperanto en Kroatio.

## VIZIO

Per konstanta laboro je konservado de arkivaĵoj atingi la pozicion de gvida Esperanto-arkivo en la suda kaj sudorienta Eŭropo kaj fariĝi rekonata kaj dezirinda partnero de la Esperantaj arkivaj institucioj en la tutgloba nivelo.

## ANKAŬ VI POVAS HELPI NIAN AGADON

**Viajn donacojn ni danke akceptas al nia bankkonto:**

**HR0723400091111000952**

**(Dokumentacijski esperantski centar)**

**Banko: Privredna banka Zagreb**

**SWIFT/BIC: PBZGHR2X**

DEC

DOKUMENTACIJSKI ESPERANTSKI CENTAR - DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO - ĐURĐEVAC

**Bana Jelačića 138A**
**HR-48350 Đurđevac, Kroatio**
**Retadreso: dec.kroatio@gmail.com**
**Telefono: +385 48 733 297 (oficejo)**
**Poŝtelefono: +385 98 248 574**

**Retejo: https://novo.dec-kroatio.hr/eo/**

## Se vi legas...

... je via dispono staras nia **LIBROSERVO**!
Serĉu niajn librojn el la Libroservo de UEA!
Petu nian aktualan libro-katalogon!



## Se vi esploras...

... je via dispono staras nia **ARKIVO**!
Ni estas la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio!
Por movadaj historiistoj neevitebla loko!



## Se vi vojaĝas...

... je via dispono staras niaj **LOĜEJO**!
Dum via vojaĝo en Kroatio,
moderpreze vi povas tranokti ĉe ni!



## Se vi verkas...

... je via dispono staras nia **ELDONEJO**!
Ni ofertas al vi kompletan servon,
ekde redaktado kaj kompostado,
ĝis eldonado kaj distribuo de viaj verkoj!

## Se vi kongresas...

... je via dispono staras niaj **KONGRESOJ**!
Ekde 2023 DEC estas komisiita organizanto
de kroataj landaj kongresoj!






En 2024 ni planas kongresi ĉe la adriatika marbordo!
Aliĝu al ni kaj havu aldone agrablan feriadon!

## Se vi iel ajn Esperantumas...

... ni organizas viajn EKSPOZICIOJN,
KONCERTOJN, PRELEGOJN,
ni serĉas partnerojn por
ERASMUS+ PROJEKTOJ ... ktp.





